

BRAZILA ESPERANTISTO

48-A JARO

NOVEMBRO-DECEMBRO 1954

N.º 488-489



SÃO PAULO

La granda brazila urbo, kiu festas en la kuranta jaro sian 4-an jarcenton.

Stuparo, kiu kondukas el la parko Anhangabaú en la straton Libero Badaró, flanke de la Urba Parlamentejo.

(Foto de la Komitato por la 4-a Jarcento)

NOVEMBRO-DECEMBRO 1954

N.º 488-489

48-a Jaro

BRAZILA ESPERANTISTO

«O Esperantista Brasileiro»

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 1.º

Telefona: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de B. E. I.
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj**QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA
BRASILEIRA DE ESPERANTO**

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Cr\$

Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto»	40,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	70,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	150,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	250,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	1.500,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	3.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º**

Rio de Janeiro, DF.

**ESPERANTA VORTTREZORO
PLIRICIGAS**

En 1887, kiam la unua vortaro kaj gramatiko de Esperanto estis publikigita, la Internacia Lingvo posedis entute 920 vortradikojn. «Universala Vortaro» de 1894, enhavis 2629 radikojn. La ses Oficialaj Aldonoj de la Akademio de Esperanto enhavas 1792 radikojn kaj 2 novajn sufiksojn, entute 1794. Do la «oficialaj (de la Akademio rekonitaj) radikoj nombras 4.423. «Plena Vortaro» (SAT, Parizo 1934, 2-a eldono) enhavas 6.900 vortradikojn kaj la 3-a eldono aperonta fine de ĉtiu jaro jam enhavos pliajn 796 radikojn, entute do 7.869 radikojn. Krom la vortrezoro en P.V. ekzistas 109 fakaj vortlistoj por fakuloj. El la radikoj oni povas formi pere de regulaj derivaĵoj proksimume 80.000 vortojn. Kompreneble por

Paul Bennemann

En Leipzig (Germanujo) forpasis la 1-an de Junio nia konata, klera samideano Paul Bennemann, 69-jara. Li gvidis nombrajn kursojn, precipe por instruistoj, faris prelegojn muzikajn ĉe Universalaj Kongresoj kaj estis kunlaboranto de multaj Esperantaj gazetoj. El liaj verkoj ni citas: *Gyges kaj lia ringo*, dramo de Hebbel; *La flavaj folioj* (la germanaj oficialaj telegramoj de la militkampoj, 1914-16); la bonegaj *Vortaroj Esperanto-germana kaj Germana-Esperanto*; kaj lia lasta verko *Miru, pensu, ridu!*

la ĉiutaga vivo, samkiel en naciaj lingvoj,, sufiĉas koni nur etan parton de la ĝenerala vortrezoro.

(El «La Suda Stelo», Zagreb, Junio 1954).

BRAZILA ESPERANTISTO

48-A JARO

NOVEMBRO-DECEMBRO 1954

N.º 488-489

VALE A PENA APRENDER ESPERANTO

Segundo conhecida lei biológica, «a função cria o órgão». Fora do âmbito biológico, esta lei encontra múltiplas manifestações no ambiente social e econômico. Na ordem linguística tem sido repetido que o Esperanto nasceu e se desenvolveu quando as condições do meio internacional convieram e o possibilitaram. Talvez houvesse fracassado, como seus predecessores, se um gênio criador o tivesse lançado para uma humanidade ainda não preparada para seu uso.

Pelo mesmo motivo, se o idioma de Zamenhof ainda não goza da preponderância que merece por suas excelentes qualidades, não se busquem as causas em seus possíveis defeitos ou nas faltas que possam ter cometido seus propugnadores. O verdadeiro, para não dizer o único motivo do relativo pouco desenvolvimento evolutivo consiste em que a humanidade não o apetece ainda com a ânsia e o fervor que os esperantistas almejam.

Na verdade, não são poucos os cientistas que ainda se comprazem em ouvir conferências para eles ininteligíveis. São numerosos os homens públicos que se resignam a escutar intermináveis cantilenas absolutamente incompreensíveis, em vários idiomas, que não conhecem. São multidão os turistas que se limitam a percorrer países es-

tranhos, sem compreender o sentido da língua falada neles, contemplando paisagens como num grande album de secas impressões. São muitos os estudantes que perdem meses e anos, antes de adaptar-se ao idioma do país em que foram estudar. Enfim, são incontáveis os ingênuos, que não passam de eternos aprendizes de idiomas que nunca chegarão a possuir com segurança e perfeição.

Enquanto existir tal ambiente de conformismo ante tão monstruosas incongruências, é difícil haver «clima» para o merecido triunfo do Esperanto. Até esse momento, o idioma internacional será somente imensa satisfação para uma minoria, que verá com pena o espectáculo de um quietismo crasso e de um fatalismo incompreensível.

Até então, serão inúteis os argumentos e as razões que se prodigalizarão durante alguns lustros, sem outro resultado que a convicção da necessidade do Esperanto, mas não seguida de sua adopção.

Entre centenas e milhares de pessoas convencidas da superioridade e da necessidade do Esperanto, poucas possuem o «clima» moral e espiritual necessário para que germine nelas a semente do idioma internacional. Até que se modifique esse «clima» actual,

PROF. IVO LAPENNA

Transire al Montevideo, kie kiel observanto de U.E.A. li ĉeestis la 8-an Ĝeneralan Konferencon de UNESKO, alvenis al Rio de Janeiro la 29-an de Oktobro, sur la angla ŝipo *Alcantara*, Prof. Ivo Lapenna, Profesoro pri Internacia Publika Juro kaj Direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado.

Atendis lin ĉe la havena kajo de lego de Brazila Esperanto-Ligo, kiu lin akceptis kaj salutis dum la elŝipiĝo, nome: Prof. J.B. Melo e Sousa, kiu en 1950 reprezentis Brazilon en la transdono de la U.E.A. Petskribo al la Unuigitaj Nacioj, D-ro Luís de Azeredo Coutinho, komitatano de U.E.A., kiu venis speciale el Belo Horizonte, Ŝtato Minas Gerais, por komplimenti



PROF. IVO LAPENNA

la Direktoron de U.E.A., S-ro Ismael Gomes Braga, F-ino Irani Baggi de Araújo kaj S-ro Vladimir Simão da Silva, respektive Vicprezidanto, Kasistino kaj Plenumsekretario de B.E.L., S-ino Carolina Vaz, edzino de la Ĉefdelegito de U.E.A. en Brazilo, kaj aliaj samideanoj. Pro malsano D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de B.E.L., ne povis persone saluti sian karan kolegon kaj amikon.

Prof. Melo e Sousa kondukis Prof. Lapenna al sia hejmo, en la marbordo Ipanema, kie li regalis lin per trinkaĵo, kaj poste per tagmanĝo ĉe Copacabana Palace Hotel, en kiu ankaŭ partoprenis D-ro Luís de Azeredo Coutinho.

Poste Prof. Lapenna vizitis la sidejon de B.E.L., kie li renkontiĝis kun ĉirkaŭ 20 samideanoj, kiuj malgraŭ la labora tago ne volis forlasi la okazon koni kaj saluti la eminentan esperantiston. B.E.L. donacis al la klera,

a custa da eloquência, da persuasão, dos exemplos e esforços dos defensores do Esperanto, devem seus adeptos contentar-se (e já não é pouco) com a satisfação de achar-se em um ambiente moral e social invejável; de contar com uma extensa família, por todo o mundo; de gozar do imenso prazer de manejar um idioma que proporciona não suspeitados contentamentos. Tudo isto significa a proporção de cem por um de rendimento por um pequeno esforço, não havendo melhor aplicação possível para um propósito altamente moral e louvável.

DR. RAFAEL HERRERO

(Tradução resumida do *Boletín de la Federación Esperantista Española*, Outubro 1954).

MIKSAJOJ

LA STONETO

Xavier Placer

Mi laŭiris somere la sekan fluejon de rivereto. Subite, sur la sablo mi vidis malgrandan ŝtoneton. Ĝi estis sendifekta, kaj mi kunprenis ĝin.

Kion vi povas diri al mi, malgranda ronda ŝtoneto? Vi estis malglata ŝtonpeco plena de akraj, malmolaj randoj, kiam vi forlasis la grandan blokon da roko. Post kiam vi estis liberigita, la akvoj alportis vin, kaj rulante sur la grundo vi travivis multajn tagojn. Dum kelka tempo vi restis kaptita en mal-luma kavo. Longatempe oni surtretis vin sub la suno, en la vojoj. Aliaj tagoj venis kaj pelis vin al la fortluado. Nun vi estas ĉi tie. Eble vi ne interrompus vian migradon, se mi ne prenis vin, ĉar vi certe ne juĝas vin ankoraŭ perfekta.

Mi komprenas, mi komprenas, malgranda ronda ŝtoneto, vian mutan par-

aktiva vizitanto kelkajan Esperantajn verkojn.

Post rapida promonado tra la ĉefurba centro Prof. Lapenna denove enŝipiĝis. Pro neatendita motivo oni devis prokrasti ĝis lia reveno el Montevideo la radiofonian intervjuon, kiun oni intencis fari ĉe la grava radiostacio «Rádio Globo».

Brazila Esperantisto faras siajn la bondezirojn, kiujn B. E. L. esprimis al Prof. Lapenna, por plena sukceso en la grava, malfacilega misio reprezenti la esperantistojn el la tuta mondo en la Konferenco de UNESKO.

olon, vian saĝan instruon. Estas necese esperi, estas necese beni la doloron, kiu malaperigas malglataĵojn kaj tranĉ-randojn — kaj poste, poste, aspiri al plena perfekteco!

Trad. Kotinju.

MAKSIMOJ

Instrui estas lerni dufoje.

Joubert

La vivo de ĉiu movado estas batalo inter unueco kaj diseco. La homo de l'unueco zorgas nur pri siaj devoj, la homo de l'diseco nur pri siaj rajtoj.

Hector Hodler

La venkitaj malfacilaĵoj ne nur instruas, sed hardas vin por pliaj agadoj.

Szarpe

Enviulojn kaj kalumniulojn vi plej bone venĝos, se vi plibonigados vin senĉese.

Diogenes

Ĉiu homo povas erari, sed persisti en eraro, tion faras nur malsaĝulo.

Cicero

Laŭ tio, kiel homo pasigas sian liberan tempon, kiel li amuzas sin, oni povas ekkoni lian efektivan valoron.

F. G. Masaryk

PETO

Sur la pordo de preĝejo en la ŝtato Novjorko estas afiŝita la jeno: «Se vi havas ĉagrenojn, venu serĉi nin. Se vi ne havas, venu ankaŭ serĉi nin, por klarigi kiel vi sukcesas akiri tian rezultaton.

JULES VERNE

En la numero de Februaro 1903 de *Lingvo Internacia*, monata gazeto por la lingvo Esperanto, kies ĉefredaktoro estis D-ro Paul Fruictier, en Parizo, kaj administranto-presisto S-ro Paul de Lengyel, en Szegzárd, Hungarujo, mi legis la jenan kronikan sciigon:

«Grupo esperantista fondiĝis en Amiens. La honora prezidanto de l'grupo estas S-ro Jules Verne, la ĉie

konata verkisto de la «Eksterordinaraj Vojaĝoj».

Tiutempe, la verkoj de Julio Verne estis la legaĵo preferata de la knaboj kaj ankaŭ de multaj maturaĝuloj.

Mi tre ĝojis, ke la ŝatata verkisto ankaŭ konis Esperanton, kaj tuj skribis al li en Esperanto, gratulante lin pro la honora prezidanteco de la Grupo fondita en la urbo, kie li loĝis.

Post ĉirkaŭ tri monatoj, li respondis per poŝtkarto la jenon:

Amiens, 17 juin 1903

Monsieur,
 Je réponds à votre aimable lettre, mais en français
 Je ne puis le faire en langue esperantiste, que je
 ne connais pas, et à mon âge, je n'aurai plus
 le temps de l'apprendre. Recevez donc
 mes compliments dans ma langue natale
 Jules Verne

«Amiens, 17 juin 1903 — Monsieur — Je réponds à votre aimable lettre, mais en français. Je ne puis le faire en langue esperantiste, que je ne connais pas, et à mon âge je n'aurai plus le temps de l'apprendre. Recevez donc mes compliments dans ma langue natale. Jules Verne.»

Kiel oni vidas, li respondis mian leteron en franca lingvo, ĉar li ne povis tion fari en Esperanto, tial ke

li ĝin ne konis, kaj pro sia aĝo li opiniis, ke li ne kapablas lerni ĝin. Tamen, Jules Verne estis tre simpatia por nia lingvo, kaj akceptis fervore la proponon esti honora prezidanto de la Grupo Esperantista de Amiens. Li promesis skribi romanon, en kiu Esperanto havus gravan rolon.

En 1928 S-ino Allote de La Fuye, nepino de Verne, publikigis libron pri

la vivo de la fama verkisto. Ŝi diris, ke ŝia avo sin montris adepto de Esperanto, kaj intencis verki libron dediĉitan al tiu lingvo, ĉar li deklaris, ke «la ŝlosilo de la homa parolo, perdita en la Babela Turo, devis esti arte reforĝita».

Grafo Afonso Celso, en artikolo pri Jules Verne en *Jornal do Brasil*, citis tiun deklaron (*Brazila Esperantisto*, Jan-Junio 1928).

Bedaŭrinde, Jules Verne mortis post nelonge, en 1905, 77-jaraĝa, ne havinte tempon por plene efektiviĝi sian promeson.

Nun, kiam oni solene memorigas en Francujo, per diversaj manifestaĵoj, la duonjarcenton de la forpaso de tiu neforgesebla genia verkisto, pioniro de tiom da ideoj rilate diversajn branĉojn de la scienco, kiuj konsistigas nian modernan progreson, ŝajnas oportuna omaĝi la memoron de la unua honora prezidanto de la Grupo Esperantista de Amiens.

A. CAETANO COUTINHO

NEKROLOGO

M. J. GAIO

La 6-an de Septembro, kiam ekresaniĝanta post grava operacio, mortis nia samideano Manuel Jorge Gaio, 80-jaraĝa, kiu dum 30 jaroj estis sindona kunlaboranto, akurata prokuristo de Federação Espírita Brasileira.

M. J. Gaio estis membro subtenanto de B. E. L.

NOVA DIREKTANTARO DE I. B. G. E.

Nomita de Ekscelenco Prezidanto de la Respubliko, enoficiĝis la 28-an de Septembro, kiel Prezidanto de la «Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística» (Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko) la ĵurnalisto D-ro Elmano Gomes Cardim.

D-ro Elmano Cardim estas Direktoro de «Jornal do Comércio», unu el la plej malnovaj kaj respektindaj ĵurnaloj en Brazilo, kaj ano de la Brazila Beletristika Akademio.

La nova Prezidanto de I. B. G. E. nomis D-ron Moacir Malheiros Fernandes Silva Vicprezidanto de la Instituto; D-ron Mário Ritter Nunes, Ĉefo de lia Kabineto; D-ron Valdemar Freire Lopes, Ĝenerala Sekretario de la Nacia Konsilantaro de Statistiko; kaj D-ron Fábio de Macedo Soares Guimarães, Ĝenerala Sekretario de la Nacia Konsilantaro de Geografio.

La du unuaj helpantoj nomitaj de D-ro Cardim estas batalantaj esperantistoj; unu el ili, D-ro Mário Ritter Nunes, estas unu el la Sekretarioj de Brazila Esperanto-Ligo. D-ro Valdemar Lopes estas ano de BEL kaj tre helpas Brazilan Esperantan movadon. D-ro Fábio Guimarães multe prestiĝigas ĝin.

La estraro de BEL esprimas al la nova direktantaro de I. B. G. E. sincere rajn bondezirojn pri sukceso, kaj esperas daŭrige ricevi de tiu grava Instituto la valoran apogon, kiun ĝi ĉiam donis al Esperanto.



Brazila Kroniko

RIO GRANDE DO NORTE

Natal — 5.^a *Convenção Nordestina de Esperanto*. La 16-an de Septembro okazis la 5.^a Nordorienta Konvencio de Esperanto kun la ĉesto de esperantistoj reprezentantaj la ŝtatojn Ceará, Rio Grande do Norte, Paraíba, Pernambuco kaj Baía.

Estraro: Prez. Pastro José Nogueira Machado; Vicprez.: S-ro Renato Lemos Dinis; Sek. F-ino Maria da Conceição Oliveira. Pluraj proponoj estis prezentitaj por diskuto. S-ro Artur Veloso proponis, ke la E-asocioj instigu la Registaron alpreni ankaŭ Esperanton en la demando de la popolnombro. S-ro Arlindo C. de Lima proponis, ke oni enskribu en la protokolon omaĝan rememoron al mortintaj laborintoj por Esperanto: Odilon Araujo (Pernambuco), Cônego Matias Freire (Paraíba), Targino Soares (Rio Grande do Norte) kaj D-ro Demócrito Rocha (Ceará).

STATO RIO DE JANEIRO

Niterói — Ĉe la Kolegio Plínio Leite, D-ro Mário Ritter Nunes faris paroladeton pri Esperanto al ĉirkaŭ 200 lernantoj de la Kolegio. Ĉeestis D-ro Plínio Leite, direktoro de la Kolegio.

D-ro M. Ritter Nunes intencas fari paroladojn en la aliaj kolegioj kaj gimnazioj en Niterói.

RIO DE JANEIRO (D. F.)

Associação dos Rádio-Ginastas komunikis al Brazila Esperanto-Ligo la inaŭguron de Esperanto-Kurso, per rekta metodo, farita en ĝia sidejo (Strato Carioca, 46, 1.^o), sub la gvido de nia samideano Nelson P. de Sousa. S-ro Osvaldo Diniz Magalhães havis ĉiam entuziasman simpatian al Esperanto.

SÃO PAULO

Mococa — Nia sindona samideano F. S. Almada, komisiita de Superintendência da Moeda e do Crédito (SUMOC) por la inspektado de bankoj, profitas siajn vojaĝojn tra la ŝtatoj por propagandi Esperanton. En la Gimnazio kaj Normala Lernejo de Mococa li faris prelegon pri nia lingvo, kiu donis kiel rezulton la decidon krei en tiu instituto kromkurson de Esperanto, kiun gvidos Prof. D-ro Abelardo Moreira da Silva.

São José do Rio Pardo — Post Mococa, venis la vico al ĉi tiu urbo, kie S-ro F. S. Almada prelegis ĉe la ŝtata Kolegio kaj Normala Lernejo «Euclides da Cunha», kun granda ĉeestantaro, speciale instruistoj kaj lernantoj.

ĈU VI PAGIS VIAN KOTIZON
POR 7955 ?



O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO



FRANÇA — O 27.º Congresso de SAT realizou-se em Nancy, a antiga histórica capital da Lorena. Inscreveram-se 553 congressistas, de 21 países, tendo comparecido ao Congresso 480, de 15 países.

O próximo Congresso deve ser em Agosto de 1955, em Linz, cidade da Áustria.

ESPAÑA — O 15.º Congresso Espanhol de Esperanto, em Saragoça, de 23 a 27 de Julho, sustentou com galhardia o verde estandarte. O Congresso aprovou as seguintes resoluções:

1.º) — Pedir à Delegação Espanhola de UNESCO sustentar, na Conferência de Montevidéu, a proposta para a introdução do Esperanto nos programas de instrução pública.

2.º) — Pedir ao Ministério de Informações e Turismo a publicação de uma

brochura em Esperanto sôbre a Espanha, para divulgar-lhe a arte, cultura, folclore e história.

3.º) — Pedir, com o mesmo fim, que a Rádio Nacional da Espanha proporcione, nos programas para o estrangeiro, irradiações em Esperanto.

ESTADOS UNIDOS DA AMÉRICA DO NORTE — Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko realizou seu Congresso de 1954, durante o qual membros de 20 Estados e Províncias dos Estados Unidos e do Canadá trataram do plano de comemoração do jubileu de EANA (50 anos de existência), em 1955.

SUÊCIA — A *Sveda Somera Semajno*, semana cultural internacional, realizada em Frostavallen, teve êste ano extraordinário êxito.

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

LA MILITO

Antônio Vieira

Milito estas tiu monstro, kiu sin nutras per havaĵoj, per sango, per vivoj, kaj kiu, ju pli ĝi manĝas kaj konsumas, des malpli satiĝas. Milito estas tiu surtera ventego, kiu renversas kampojn, domojn, vilaĝojn, kastelojn, urbojn, kaj iafoje en la daŭro de momento forglutas tutajn regnojn kaj monarkiojn. Milito estas tiu malfeliĝego, konsistanta el ĉiaj malfeliĝegoj kaj en kiu ekzistas nenia malbono, kiun oni ne travivus aŭ ne timus, nek ia have, kiu estus propra kaj sekura. En sekureco ne ha-

vas la patro sian infanon, riĉulo sian riĉaĵon, malriĉulo sian ŝviton, nobelo sian honoron, ekleziulo sian imunecon, religiulo sian ĉelon, kaj eĉ Dio en la temploj kaj tabernakloj ne sidas ekster danĝero.

* * *

Demos acima a tradução do trecho do Padre Antônio Vieira — «A Guerra», publicado no número anterior.

Continuaremos, no próximo número.

HELPU AL LA MOVADO, VARBANTE NOVAJN MEMBROJN !



LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto,
Medeiros e Albuquerque,
Viriato Correia**

XI

ERARA VOJO

Melo Bandeira trodikiĝis venke kaj havis sufiĉegajn motivojn por ŝveli de fiero, tial ke lia sagaceco forigis pli evidente la mallumon, kiu envolvis tiun aferon, ol ĝin estus farinta lia propra lanterno. Tiu afliktita ekkrio, kun kiu la junulino sin ĵetis en la brakojn de Cardoso, estus eltirinta el lia buŝo la krimon *Eureka*, se li estus sciinta alian signifon de la historia vorto, krom tiu, kiun li tiel bone konis pro la grandaj servoj, kiujn al ili ĉiam faradis la preparaĵo, tiel efika en la frotpurigo de subskriboj kaj aliaj artifiko.

Li ne ekkriis, male, li enfermiĝis en la silenton lasante, ke la sceno inter la gefianĉoj plilongiĝu, esperante tiri ĉion el la emocio de la junulino kaj el la konfuziĝo de la kuracisto, kiu jam komencis perdi la kapon, preskaŭ konvinkita (tia estas la povo de la sugestio), ke li mem estas la murdinto de la bankiero.

Kaj f-ino Rosa, agitata de la plorsingultoj, ripetadis kun la kapo sur la brusto de la maltrankviligita kuracisto:

— Mi neniam pensis, ke vi estus kapabla.

Fine, Melo Bandeira, antaŭenirante gravamiene, diris kun voĉo forta kaj ordona:

— Sinjoro doktoro Cardoso!

La kuracisto turnis la vizaĝon kaj rekte alrigardis la viron teruran, la okulon de la polica saĝeco, la unuan flaron de la Publika Justeco. Kaj Melo Bandeira parolis:

— Pardonu min... Mi tre bedaŭras interrompi scenon vere emociigan kaj indan je gefianĉoj, kiuj sin amas, sed la Leĝo trudas al mi la malĝojigan devon daŭrigi. Ni estas ĉi tie por venĝi la socion, makulitan per la sango de unu el ĝiaj plej honorindaj membroj, kaj vi...

Kaj li deziris, kvankam delikate, apartigi la paron. Sed D-ro Cardoso, kiu tiel malvigliĝis pro la lerta demandado, al kiu li estis submetita, transfiguriĝis vidante, ke la majoro kuraĝas tuŝi la delikatan manradikon de tiu, kiu estos lia stelo en la vivo.

— Kion vi faras, Majoro! Mi malpermesas, ke vi tuŝu tiun junulinon! Mi toleradis ĉiujn viajn impertinentaĵojn, sed mi kontraŭstaros la insulton, se vi ĝin kuraĝos, ĉu vi komprenas?

— Pardonon, doktoro! Mi neniel volas ofendi vin, nek la fraŭlinon. Mi estas bonedukita persono, sed koncerne la plenumon de la devo mi saltos super ĉio. Pacienca!

— Super ŝi vi ne saltos!

— Mi saltos, doktoro. Ĉi tie mi estas la Justeco kaj la Justeco estas blinda, ĝi vidas nenion. Mi saltos super ĉio. Vi bone vidas, doktoro, ke mi estas trankvila, mi ne ekscitiĝas. Skandaloj ne efikas. Se vi, doktoro, estas senkulpa, pro kio vi koleriĝas? La vero ĉiam aperas. Ni perdas nian tempon. Ju pli rapide ni agos des pli bone por ni ĉiuj. Ĉu vi ne havas saman opinion, fraŭlino?

Li faris la demandon per milda voĉo al la ĉagrenita junulino, kiu levis sian belan vizaĝon superversitan de larmoj kaj rigardis surprize tiun viron, kiu parolis al ŝia fianĉo, kuracisto de la ŝtata Urĝa Helpejo, kvazaŭ li sin turnus al iu ajn krimulo. Kaj li insistis:

— Ĉu vi ne havas saman opinion, fraŭlino? Mi devas fini tion kaj anstataŭ malŝpari vortojn estus pli bone, ke ni decidu tuj la aferon. La viro estis malbona kaj avara, li kontraŭstaris vian geedziĝon... Atentu, fraŭlino, ĉu vi volas, ke mi diru ion al vi? mi ne estas kapabla mortigi muŝon, jes, mi ne estas, sed se mi estus via fianĉo kaj se iu kontraŭstarus mian edziĝon...

— Kalumnianto! — Cardoso ekkriis, sin jetante kun pugnigantaj manoj sur la Majoron, kiu prudente malantaŭen paŝis, farante signon al la du policistoj, ke ili detenu la kuraciston, kiu grincis per la dentoj.

F-ino Rosa Guerreiro terurigita rigardadis al ĉiuj, kvazaŭ ŝi serĉus inter tiuj viroj indiferentaj kaj severaj, iun pli bonkoran, kiu kompatu ŝian situacion. Fine, impetege, fortigita de la amo, ŝi antaŭenpaŝis kolera kaj dum tiu puŝo antaŭen, ŝia ĉapelo falis, ŝiaj longaj haroj displektigis kaj envolvis ŝin per ondo de brila oro. Kaj kun ŝiaj ruĝaj vangoj, la buŝo sangkolorigita, la okuloj fulmbrilantaj ŝajnis, ke ŝi tute ekflamiĝas kiel la valkirio sur la monto, ĉirkaŭata de flamoj. Kaj tiuj viroj estis preskaŭ venkitaj de tia potenca beleco.

— Ĉu vi vidas? — ŝi diris al Cardoso, parolante al li rekte en la vizaĝo. — Ĉu vi vidas? Mi pensis, ke vi serĉas! Mi neniam imagis, ke vi estus kapabla! Neniam! Neniam! Neniam!

Kaj ŝi ĵetis sin sur la sofon singultante.

Cardoso rigardis perpleksa, ne komprenante tiujn kompromitantajn vortojn, kaj kiam la majoro, kuraĝiĝante alfronti lin, demandis kun ironia rideto, fikse lin rigardante en la okulojn: — Nu?! — li cklevis la ŝultrojn kaj nur respondis:

— Mi ne scias. — Poste li diris: — Demandu ŝin. Mi ne scias, kion ŝi volas diri per tiaj vortoj. Mi ne scias.

— Sed mi scias, mia kara doktoro. — Kaj tiam turnante sin al Lobato, kiu restis kvazaŭ ŝtonigita, kun ŝtopita buŝo, rigardante precipe la belajn harojn de f-ino Rosa, kiuj kaskade falis sur la plankon, li ekkris triumfe:

— Ĉu vi estas konvinkita, sinjoro doktoro? Saĝe diras la popolo: Dio donis oficon, Dio donos kapablecon. Unuj estas kapablaj fari ĉi tion, aliaj tion. Mi havas la kapablecon autaŭsenti la krimon. Kiam mi trovas ĝian signon, mi ne ĝin perdas. Jen ĝi! — kaj li premis la lipojn, kaj pugnigis minace sian manon.

Trankviliĝinte, la kuracisto sin direktis al sia fianĉino kaj diris laŭte, por ke ĉiuj lin aŭdu:

— Rosa!

Impresita de la tono de lia voĉo, la bedaŭrinda junulino levis sian belan kapon.

— Kion vi volas diri per tiaj vortoj, kiuj taŭgas ĝuste por firmigi la suspekton pezantan sur min, ke mi estas la murdinto de mia onklo?

La junulino stariĝis subite kaj kun la okuloj elorbitigitaj, la buŝo duone malfermita, rigidiĝinta, ekkriis:

— Onklo Sanches! Murdita!

— Jes... Ĉu vi ne scias?

— Ne... Kiam?!

— La pasintan nokton.

Rosa mallevis la kapon kaj restis dum momento senmova. Subite ŝi rektiĝis kaj diris rigardante supren, kvazaŭ ŝi parolus al ia mistera figuraĵo vidata nur de ŝi.

— Kiu scias, ĉu ne estis li? De kelka tempo li hazardludas... li ne revenis hejmen... Kiu scias?!

En tiu sama momento policisto aperis ĉe la pordo, salutis Lobaton kaj ĉar la delegito faris demandon al li per kapsigno li antaŭeniris kaj flustris kelkajn vortojn.

— Certe. Enirigu...

La policisto foriris kaj Melo Bandeira estis daŭrigonta la demandaron, kiam Rosa, kiu sin turnis al la pordo, surpriziĝis kaj sin regante por ne krii rigardis kun mirego la viron de la vertoĉapo, kiu eniris kondukata de la policisto, kiu parolis al Lobato.

— Naiva Joĉjo!

La viro de la vertoĉapo respondis al sia nomo kaj rekoninte la junulinon li sin ĵetis al ŝiaj piedoj, surgenuje, plorante.

— Ha! f-ino Rosa! Savu min! Ili diras, ke mi mortigis la maljunulon... Mi, mi? Oni scias, ke mi ne kuraĝas fari ion similan, ĉu ne vere, f-ino Rosa?... Oni batadis min per cidonibrando, kaj pro tio mi eĉ ne povas sidi... Vi bone agis venante ĉi tien, f-ino Rosa. Mi ne povis suferi pli. Mi estis preskaŭ dironta, ke mi mem mortigis lin, por ne plu suferi.

Bone malbone, en la Juĝejo oni sin malimplikiĝas, sed ĉi tie, kun tiu amaso da policistoj sur ni: jen vipo! jen vipo! Ha! f-ino Rosa, kompatu min.

Kaj kun la vizaĝo surtere, li kisadis la belajn piedojn de la fianĉino de Cardoso. Pro la surprizo, oni silentiĝis kaj ŝi interrompis la silenton demandante al la kompatindulo:

— Kial vi ne revenis domen?

— Kial? Ĉu vi ja demandas? Pro tio, ke li arestis min.

— Vin? Pro kio?

— Pro tio, ke li trovis min en la ĝardeno. Mi restis iomete en la kuirejo parolante kun la kuiristino; oni trinkis bieron, oni forĝesis la tempon. Kiam mi estis forironta, la tumulto komenciĝis, ĝi estis konfuzego kaj granda kvanto da policistoj... Mi volis foriri, sed mi sentis ion, pro la teruro... Mi kaŭriĝis apud la arbetaro kaj mi tie restadis ĝis ili trovis min...

— Kun la vertoĉapo de la murdinto kaj kun la poŝoj plenaj de mono, — diris Lobato, de la supro de sia aŭtoritateco.

— Ĝi estas tio, — jesis la viro. — La vertoĉapo estis donita al mi de mastro Sanchez mem, ĉar f-ino Rosa ordonis, ke mi ĝin portu, ĝi estis malnova kaj malpura kaj ŝi volis fari novan. Ĉu ne vere, f-ino Rosa? Ĉu ne estis vi, kiu ordonis min porti ĝin?

— Ĝi estis mi, — jesis f-ino Rosa Guerreiro.

— Kaj la mono?!... La mono, kiun vi havis en la poŝoj? — la delegito arogante insistis.

La viro konfuzita gratis al si la kapon, oblikve rigardante f-inon Rosa kaj kun rideto duone naiva, duone ĉagrenita, murmuris:

— Se vi promesas, ke vi ne arestos min, nek prenos de mi la monon, mi diros la veron.

— Nu! diru!

— Ĉu vi promesas?

— Mi promesas...

— La mono venas de la meleagro.

— Kia meleagro?

— De la meleagro de tiu S-ro Gregório.

Kaj li fingromontris la maljunan serviston de f-ino Rosa.

— Li petis al mi, ke mi ludu en la bestoj-ludo (*) kaj mi tion faris, do la mono apartenas al li. Se vi ne kredas, mi povas diri la nomon de la lotvendisto, iu policano, kiun vi certe konas. Kaj pro tiu malbenata vertoĉapo kaj pro la meleagro lotumita hieraŭ, bedaŭrinde por mi, mi estas ĉi tie tute dolorigita.

Melo Bandeira gratis al si la mentonon kaj demandis trankvile.

— Ĉu vi do fraŭlino venigis la vertoĉapon?

— Jes.

— Kaj kial vi venigis la vertoĉapon? — li demandis kun sarkasma rideto, rememorante la misteran frazon diritan, kiam ŝi sin ĵetis en la brakojn de Cardoso, ploregante: "Ŝi pensis, ke li serĉas... Ŝi neniam imagis, ke li estus kapabla, ĉu ne?" — Kapabla pri kio, fraŭlino? Diru! — li kriis minace.

COELHO NETO. — Tradukis Y.

(*) Populara hazardludo, en kiu oni ludas per la nomoj de 25 bestoj.

MOKUSATSU


A tradução errada desta palavra japonesa ocasionou o lançamento da bomba atômica em Hiroshima e Nagasaki.

Em Julho de 1954, quando chegou ao Japão a notícia de que os aliados, em Potsdam, apresentaram um *ultimatum* para a capitulação, o Primeiro Ministro japonês Suzuki dissera aos repórteres que o procuraram, que êle seguia uma política de *mokusatsu*. Os jornais traduziram essa palavra, de duplo sentido, por *fingir ignorar, não tomar conhecimento*, conquanto Suzuki quisesse dizer simplesmente — não comentar. Daí, a bomba atômica e a invasão da Manchúria pelos Russos.

Eis a falta de uma língua clara, internacional.

(Heroldo de Esperanto e La Rondo, Jan. Fev. 1954).

Bibliografio



O IDEALISMO E O ESPERANTO — *M. A. Teixeira de Freitas* — I. B. G. E. — Conselho Nacional de Estatística. 61 p. 1954.

La parolado "O idealismo e o Esperanto", farita de D-ro M. A. Teixeira de Freitas dum la inaŭgura solena kunsido de la Unua Konvencio de la Esperantistoj de Stato Rio de Janeiro, en Novembro pasinta, estas presita en aparta broŝureto kaj oferdonita de Niterói Esperanto-Klubo.

Bonega faro, kiu donas al niaj samidanoj, kiuj ne partoprenis la Konvencion, okazon povi ĝui la legadon de tiu ĉi erudicia parolado.

Karl Vanzelow — **NIA LINGVO ESPERANTO** — Elektita poezio por deklamo kaj por kanto. Tria kajero de dua serio. Ardesia — eldono — Berlino.

Nia fervora samideano daŭrigas la serion de poezioj en Esperanto. Nun aperis la 3-a kajero de la 2-a serio, kiu certe, same kiel la antaŭaj, plaĉos al siaj legantoj.

GENT, LA MONUMENTA — Interesa Esperanta prospekto kun mallonga historia resumo kaj multaj bildoj de nombraj belegaj monumentoj, muzeoj, preĝejoj de ĉi tiu belga urbo, kiu jam dum la 7-a jarcento estis menciita. Nune ĝi estas fama pro sia teksaĵindustrio. Eldonita de la Urbestraro de Gent, Belgujo.

VOLENDAM — Bela prospekto en Esperanto pri ĉi tiu malnova fiŝista vilaĝo nederlanda, kie ankoraŭ restas konservataj la nacia kostumo kaj la tipaj malgrandaj dometoj.

VIZITU SKANDINAVUJON — Prospekto pri rondvojaĝoj en Danlando, Norvegujo, Svedujo kaj Finnlando, per la modernaj ŝipoj de D.F.D.S. el Kopenhago.

BONN — Broŝureto pri la nuna ĉefurbo de la Germana Federacia Respubliko, kun nombraj bildoj de la naskiĝurbo de Beethoven kaj priskriboj en germana, angla, franca lingvoj kaj aldonita folio en Esperanto kaj aliaj lingvoj.


BREVE HISTÓRIA DO DR. ZAMENHOF e a lingua internacional Esperanto — Dua eldono de propaganda broŝureto. Interfrata Esperanta Klubo. 1954 — São Paulo.

DANIEL QUARELLO — *Breve historia del Esperanto*. Dua eldono pligrandigita. Eldono Fakoj de "E.C.O." 1954 — Buenos Aires.

RAPORTO PRI LA APLIKADO DE ESPERANTO EN DANUJO — Por ke la Sekretariejo de UNESKO povu fari raporton prezentotan al la 8-a ĝeneralkunveno de la organizaĵo, en Montevideo, la danaj Esperanto-organizaĵoj ellaboris interesan, legindan raporton pri Esperanto en Danujo, kies tradukon el la dana lingvo ni ricevis.

Ĝi informas pri la historio, Esperanto-instruado, organizaĵoj, beletristiko, scienca literaturo, revuoj eldonitaj, praktikaj celoj, kongresoj, ekspozicioj, prelegoj, studvojaĝoj k.a.

(Daŭrigo sur paĝo 15)



Recenzo

Wilhelm und Hans Wingen — **ESPERANTO IN DER TASCHEN** — Ein Sprachführer für alle Gelegenheiten des täglichen Lebens verbunden mit einer vollständigen Sprachlehre (Esperanto en la poŝo — gvidlibro pri ĉiuj bezonoj de la ĉiutaga vivo bindita kun plena gramatiko de la lingvo). Eldono de Verlag der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn — Esperanto-Abteilung. 46 p. 12 x 23 cm. Prezo en B.E.L. Cr\$ 20,00

Bele presita broŝuro tre lerte aranĝita, en kiu aperas unue la gramatiko de E. kaj poste la bonega gvidlibro por la konversacio germane-Esperante. Bonega frazaro pri ĉiuj temoj de la ĉiutaga vivo povas esti tre utila ne nur al germanlingvanoj, sed al ĉiu komencanto.

F. Omelka — **LA ALASKA STAFETO kaj KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ** — Originale verkitaj en Esperanto. — Eldono de The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth, Anglujo. — 1 vol. 96 p. 22 x 14,5 cm., bele bind. Prezo Cr\$ 40,00 en la libroservo de B.E.L.

Ambaŭ rakontoj unue aperis en «Esperanto» de U.E.A., kie ili akiris multajn amikojn. La manuskripton zorge korektis S-ro Mason Stuttard.

La Aŭtoro estas instruisto kaj talente skribas por geknaboj, kiujn li fervore amas; tial li verkas kun varma koro, ne per malvarma cerbo.

Li naskiĝis en 1904 kaj lernis Esperanton en 1932. Liaj edzino kaj filino estas ankaŭ esperantistinoj kaj liaj unuaj legantoj kaj kritikantoj.

Kiel ĉiuj eldonoj de E.P.C., tiu ĉi libro estas en ĉiuj sencoj perfekta: lingvo, revizio, preso, papero, bindaĵo neriproĉeblaj.

Ĉiu samideano donacu ĝin al juna samideano(in)o por veki intereson por nia originala literaturo. Esperanto eniris en la epokon de sia sendependiĝo: nia originala literaturo kreskas kaj plialtigas senĉese sian nivelon. Niaj modernaj verkistoj kreas la tutmondan kulturon por la estonta homaro. Ni jam havas dekojn da junaj talentaj verkistoj kaj poetoj en Esperantujo.

Sankta Ignacio de Loyola — **SPIRITAJ EKZERCADOJ** — (Rekte tradukitaj el la hispana originalo laŭ eldono de «El Mensajero del Corazón de Jesús»). —

Zaragoza 1952. 1 vol. 8,5x12,5 cm.; 206 p. Prezo Cr\$ 20,00 ĉe la libroservo de B.E.L.

Grava religia verko de eminenta kaj mondfama Aŭtoro! Ĝi meritas pli bonajn tradukon kaj revizion. La nuna estas mallerte tradukita kaj enhavas multajn preserarojn.

Karel Havlíček Borovský —
LA BAPTO DE CARO VLADIMIR — legendo el la rusa historio. El la ĉeĥa esperantigis Tomáš Pumpr. 1 vol. 16 x 22 cm., 142 p., kun multaj ilustraĵoj. Prezo Cr\$ 80,00 en la libroservo de B.E.L.

Ĝi estas la dua libro el la serio Stafeto. La unua estis la monumenta poemaro «Kvaropo», kiun ni jam recenzis kun granda entuziasmo.

La komentarioj multon instruas al ni pri historio kaj meritas grandan atenton. La poemo estas majstroverko de satira literaturo, plena de maldeklitaj vortoj. La malnova rusa dio de la fulmotondro estis kondamnita je morto kaj finfine la Caro serĉis alian religion.

Bedaŭrinde la poeto mortis antaŭ ol fini sian poemon. Ni havas nur parton de la verko, sed la libro estas tre interesa kaj la traduko montros, ke Esperanto perfekte taŭgas por esprimi la krudaĵojn de malaltnivela satiraĵo.

La poemo egale mokas la katolikojn, la judojn, la mahometanojn kaj la grekortodoksojn.

Al religiemaj personoj mi tute malkonsilas tiun libron, kiu ne povas doni al ili plezuron, ĉar ĝi estas tre malrespektema.

I. G. B

Bibliografio

(Daŭrigo de paĝo 13)

TRIESTO AL KIU? — Eld. Slovenia Esperanto-Ligo, Ljubljana, Jugoslavio.

Ĉi tiu broŝuro temas pri la problemoj de Triesto, la konflikto inter Jugoslavio kaj Italujo. Ĝi montras la historion, evoluon, etnan bildon de Triesto, kaj sciigas pri packontraktoj, traktado, la rolo de anglo-usonaj okupantaj aŭtoritatoj, la Itala ekspansiiismo kaj proponoj de Jugoslavio por la solvo de la Triesta problemoj. La Esperantan eldonon redaktis Zlatnar Peter.

SENNACIEGA REVUO — 1954. 56 p. Ĉi tiu eldonaĵo estas la tria el la nova serio. Riĉe ilustrita, kun bonega enhavo, prezentanta eliton de kunlaborantoj, inter ili nia Ismael G. Braga.

JARLIBRO de la Universala Esperanto-Asocio 1954 — Dua parto. Informoj, raporto de la Akademio, de la Estraro de UEA, de la Landaj Asocioj kaj Matematika Terminaro, de C.M. Bean.

Disco em Esperanto

NORMA GUERRINI

Kanto de l'Ekzilo

Sankta Lucio

Preço — Cr\$ 40,00. Pelo Correio, registrado — mais Cr\$ 5,00

SERVIÇO DE LIVROS DA BEL

ESPERANTO KONGRES-VALSO

Muziko: Peter Schwarz

Eldonaĵo de Austria Esp. Federacio

Prezo — Cr\$ 10,00

LIBROSERVO DE BEL

PLIALTIGU VIAN KATEGORION
EN U. E. A.

ESPERANTO NA IMPRENSA DO BRASIL

Recebemos os seguintes periódicos, com artigos, comentários e notícias sobre o Esperanto, de vários Estados:

PARÁ — *Folha do Norte, A Provincia do Pará, Boletim Semanal do Rotary Club de Belém*, de Belém.

RIO GRANDE DO NORTE — *Diário Oficial, Diário de Natal, Jornal de Natal, Tribuna do Norte, O Poti, Divisa*, órgão do Departamento Cultural da ASSEN ("Esperanto, abraço através do Oceano", artigo de Hélio Silva), de Natal.

PERNAMBUCO — *Diário Oficial, A Verdade, A Voz da União* (secção "Esperantismo", de Da Silva, Recife).

BAÍA — *Jornal do Comércio, Diário da Baía* (série de artigos), Salvador; *O Intransigente*, de Itabuna.

ESTADO DO RIO DE JANEIRO — *Mosaico Fluminense* (artigo do Dr. Francisco Miguens), Nilópolis.

MINAS GERAIS — *Diário Mercantil, Gazeta Comercial*, de Juiz de Fora; *Folha do Povo* (artigo de Campozzini Filho), de Ubá.

SÃO PAULO — *Fôlha do Povo*, São Paulo; *O Município*, de Leme; *Correio de Notícias*, de Ourinhos; *Gazeta do Rio Pardo*, de São José do Rio Pardo.

PARANÁ — *Diário Oficial, O Dia, Gazeta do Povo, O Estado do Paraná*, de Curitiba.

SANTA CATARINA, — *Revista do Sul "O Vale do Itajaí"* (artigos de Carlos Geiser e de Osmann de Oliveira), de Blumenau.

RIO GRANDE DO SUL — *AOR, Reencarnação*, de Porto Alegre; *Orientador* (artigo do Dr. João Correa Severo), de Passo Fundo.

DISTRITO FEDERAL — *Reformador, Diário de Notícias, Correio da Manhã, Revista "Manchete"* (Reportagem — Eles morrem por uma idéia: 10 nomes, entre eles o do Dr. Carlos Domingues, como esperantista).

EDIÇÕES DE HEROLDO DE ESPERANTO

	Cr\$
HEROLDO DE ESPERANTO, gazeta bimensal. Assinatura anual	100,00
PRINTEMPO EN LA AŬTUNO, Baghy	20,00
LA AMO EN LA JARO DEKMIL. Elola (Berenguer). Romance. Encadernado	50,00
LA MISTERO DE L'SANGO. Forst de Battaglia (Jung). Ciência Popular. Ricamente ilustrado. Enc.	35,00
LANDOJ DE L'FANTAZIO. Jung. Romance Original. Enc.	70,00
LA MONDON AL NI! Kilian. Aventuras de viagens	20,00
VAGABONDO KAJ SINJORINO. Kloepffer (Goppel). Romance. Enc.	50,00
LA MARO. Contos. Enc.	35,00
ANSTATAŬA EDZINO. Maxwell (Sampson). Romance. Enc.	50,00
PRO DIO, NE ESPERANTISTON! Minor. Comédia em 1 acto	8,00
KIKI I e KIKI II. Osmond	15,00
SE GRENERETO. Robinson. Contos originais. Enc.	30,00
KREDU MIN, SINJORINO! Rossetti. Romance original. Enc.	70,00
DU MAJSTRO-NOVELOJ. Strom (Heitmüller). Enc.	35,00
SUB LA SIGNO DE L'ESPERO. Contos da vida esperantista	8,00
LA MORTO DE DANTON. Tolstoj (Hohlov). Tragédia	15,00
ESPERANTO KAJ KULTURO. Trögel (Schröder)	8,00
KIEL ARANGI KURSOJN KAJ GRUPVESPEROJN? Wingen	8,00
LA OKULOJ DE LA ETERNA FRATO. Zweig (Wolff)	30,00
LA LINGVO DE LA BESTOJ. Florence Barker	4,00
MIRU, PENSU, RIDU! Bennemam. O libro do bom humor. Enc.	70,00

SERVIÇO DE LIVROS DA LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO